NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespare
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
NOVEMBRO 1997

# KRISTNASKA LOTERIO

Jam estas preta Loterio kiu helpas ekonomie al la Liceo: **Nº 45.680**.
Vi povas aĉeti biletojn po 200 pesetoj en nia sidejo aŭ peti ilin, ni sendos poŝte (antŭpago necese pere de poŝtmandato)

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

Aperis en la hispana revuo "Netmani@" la titolo "El idioma del mundo" komentoj pri la TTT-paĝo de HEF *"ĝi prezentas objektivan kaj bon-kvalitan informon pri la lingvo esperanto kaj ĝia kulturo"*

## EKSTERLANDE

La esperanto-muzik-magazino "**Rok-gazet'**", eldonata en Francio de Eurokka (E-rok-asocio) kaj kun helpo de FAME-Fondaĵo, Eduka Fondaĵo Carson kaj Eŭropa Junulara Fondaĵo, aperigis la 1997-numeron, 52 paĝoj en esperanto pri muziko. La numero inkludas katalogon de diskoj surbendigitaj en esperanto kaj dosiero pri la pli famaj esperantaj muzik-grupoj, inter ili la hispana kantisko **Solo**, (Eduardo Vargas) el Malago kies lasta kasedalbumo enhavas titolojn de la "Ibera Skolo" (Miguel Fernández, Camacho kaj Neves).

## ESPERANTO EN "INTERNET"




Komputiloj pli kaj pli penetras en la ĉiutagan vivon. Ili ofte estas ligitaj per retoj, kio ebligas rapidan kaj facilan komunikadon kaj interŝanĝadon de informoj. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, ili estis ĉefe uzataj en Usono. Dum la lastaj jaroj, komputilaj retoj ekfuroris ĉie en la mondo. Ili precipe valoras en situacioj en kiuj aliaj komunikeblecoj malfacilas, ekz. en landoj, kie telefona aŭ paperpoŝta komunikado ne estas sufiĉe fidinda.

De la momento de la ekesto de tiaj retoj, ankaŭ esperantistoj aktivas en ili. Se vi laboras per komputilo en universitato aŭ granda firmao, povas esti, ke vi jam povas uzi komputilajn retojn, plej ofte la t.n. WWW / TTT (World Wide Web / Tut-Tera Teksaĵo), Internet aŭ Bitnet. Se vi hejme havas komputilon kaj modemon, vi povas tra loka bultenejo (BBS – Bulletin Board System) kontraŭ malaltaj kostoj konektiĝi al servo, kiu ebligas al vi uzadon de la reto (ekz. CompuServe aŭ Internet). Preskaŭ ĉiuj retoj estas interligitaj, do se vi havas konekton al iu reto, vi plejofte ankaŭ povas atingi personojn (aŭ informojn) en aliaj retoj.

La eblecoj de via retkonekto konsiderinde varias kun la servo, la tipo de la reto al kiu vi konektiĝas, kaj la tipo de konekto, kiun vi uzas. Plej gravas la tipo de la konekto: rekta aŭ nerekta. Se vi havas rektan konekton, la komputilo per kiu vi laboras havas daŭran ligon al la reto. Ekzemploj estas komputiloj en Internet aŭ Bitnet. Se vi havas nerektan konekton, la komputilo per kiu vi laboras regule kontaktas alian komputilon. Ekzemplo estas via propra komputilo, kiu per modemo kontaktas bultenejon en Fidonet, aŭ servon, kiu havas Internet-konekton.

Juan del Castillo sendis e-adreson de la poŝtlisto "soc-culture-esperanto". Ĝi konsistas el ĉirkaŭ 800 listanoj, kvankam nur 30 estas agemaj. Pere de tiu listo oni diskutas precipe pri lingvaj aferoj. Por aliĝi sufiĉas sendi mallongan mesaĝon petantan tion, poste vi ricevos dulingvan konfirm-respondon kaj kelkajn avertojn. La e-adreso nur por aliĝi estas: esperanto-1-request@netcom.COM

En la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo informanta pri Esperanto aperas "Adresaro de Hispanaj Esperantaj Grupoj" eldonita de Madrida Esperanto-Liceo:www.ciudadfutura.net/esperanto
Ekde marto ekzistas en la reto 35 E-revuoj, vi povas konsulti ĉe: www.esperanto.es/virtualagazeto.html. Ankaŭ vi povas vidi tri bultenojn kiuj informas pri esperanto en la dana, sveda kaj hispana (Monate ĉe vi)

| | |
|---|---|
| Nova adreso de AEU: | www.ciudadfutura.net/esperanto |
| Informoj pri esperanto: | www.esperanto.net |
| | home.adv.es/esperanto |
| Forumo en esperanto: | esperanto-1-request@netcom.COM |

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

La 20an kaj 21an de septembro, organizita de la Liberecana E-grupo de Toulouse (Francio), okazis en Coll de Nargó, Katalunaj Pireneoj, la 1a Renkontiĝo de liberecanaj esperanto-grupoj kun la celo de interkonatiĝi, efektivigi kunlaboradon, festumi, esperantumi, ktp. La Ibera Liberecana Grupo de Madrido, proponis la kreadon de Eŭropa Liberecana Esperanto-Federacio. (Informas Liberecana E-Grupo de Toulouse)

83-a UK Montpeliero (Francio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1998
84-a UK Berlino (Germanio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1999
50-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. 16-22a majo 1998. Aalborg (Danio)

## REZOLUCIO DE FIGUERES (HdE 97-08-11)

Kunvenintaj en Figueres de la 1a ĝis la 4a de majo, la gekongresanoj de la 28a Kataluna kaj 1a Transpirenea Kongreso de Esperanto:

**konstatas**

— La kreskantan gravecon de la rolo de la Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) (pri evoluo, kulturo, defendo de Rajtoj homaj, civitanaj, lingvaj, etnaj, pri la medio kaj aliaj) en la globala panoramo de la internaciaj rilatoj, kaj ni komprenas kiel NRO-j tiuj organizaĵoj kiuj naskiĝintaj pro la socia volo kaj klopodo, luktas por la starigo de vere nova monda ordo kiu respektu kaj garantiu la homajn kaj popolajn rajtojn.

— La malobeon pli kaj pli maltrankviligan de la plej elementaj rajtoj homaj, civitanaj, lingvaj, etnaj, kulturaj, mediaj ktp. nepraj por tutmonda kunvivado digna kaj justa;

**kaj fariĝas perantoj**

de la justaj postuloj de la NRO-j partoprenantaj en la Kongreso:

— Tiuj pri pacaj movadoj kiuj opinias ke oni devas krei la socie justajn kondiĉojn, por ke la paco firme enradikiĝu.

— Tiuj pri evoluo kaj justa komerco kiuj manifestas sian maltrankvilon antaŭ la malekvilibroj inter nordo kaj sudo, kiujn kreis la regantaj ekonomiaj sistemoj;

**denuncas**

— Ke ankoraŭ nuntempe oni torturas kaj murdas pro kialoj konsciencaj, kulturaj, etnaj, religiaj, laŭ seksa inklino, lingvaj, politikaj, antaŭ la pasiveco kaj foje eĉ kunkulpeco de tiuj landoj el la unua mondo.

— La blindecon de la regantoj kaj de la institucioj kiuj gvidas la ekonomiajn internaciajn rilatojn, kiel la Monda Banko aŭ la Internacia Monfonduso.

— La ambiguan politikon de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio, kiuj laŭdire defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj siaj civitanoj, kio tamen ne konkretiĝas en realaj leĝoj por la defendo kaj promocio de la minoritataj lingvoj.

**Apogas** la alternativojn kaj proponojn kiujn starigas la NRO-j, ĉar konstateblas ke tiuj organizaĵoj pli efike kaj fidele ol la ŝtatoj, povas atingi la realigon de tiuj celoj.

**Petas** al la ĝenerala publiko kaj ĉefe al la geesperantistoj ke ili apogu la NRO-jn kaj aktive partoprenu en ĝiaj agadoj.

Ankaŭ peras la proponojn de kelkaj NRO-j en la senco ke la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel helpa interrilata rimedo inter ĉiuj homoj kaj popoloj, povas faciligi la demokratecon de la lingvaj internaciaj rilatoj.

## *KORESPONDA KURSO*

*HEF-Co organizas, je nacia nivelo, koresponda kurso (poŝte kaj pere de internet,* lau la libro "El esperanto: curso de la lengua internacional". La materialo inkludas libron, ekzercojn kaj kasedon. Prezo: 14.900 ESP. Pago: remburse aŭ pere de bank-konto Caja Postal nº 14.011.966, je la nomo de Federación Española de Esperanto

## HISPANIO

La 12-an de oktobro du membroj de la grupo "Fido kaj Espero" de **Valladolido** legis paragrafon de "El Quijote" en la esperanta versio tradukita de Fernando de Diego kaj eldonita de Fundación Esperanto, en Kultura aranĝo okazinta en "Casa de Cervantes".

César Mosteyrín daŭrigas la instruadon de Esperanto en **Segovio** en la Centro por Tria Aĝo sed kun gelernantoj sen aĝ-limo.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4º

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Prelegoj:** 19,30 horo en Atocha 98-4º

17-an de Novembro "Bunta Gvatemalo". Lupe Sanz

**Kursoj:**

Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.

Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18

## *ZAMENHOFA BANKEDO*

***Kiel kutime la bankedo (tagmaĝo) kazos en Hotel Puerta de Toledo la 20-an de decembro (14.30 h). Interesatoj telefonu al Pepe Platas 468 51 63***

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal